

# NIA VOĈO

## Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid  
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3°-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

**APRILIO 2006**

### **“El hombre que desafió a Babel”**

La libro kiun ĉiuj esperantistoj devas legi

Hispana versio de la biografio de Zamenhof verkita de Masson/Centassi tradukita far membroj de Madrida Esperanto-Liceo. PVP 20 eŭroj.

Ĝis la Hispana Kongreso, fine de julio 2006: po 23 eŭroj vi ricevos **“El hombre que desafió a Babel”** kaj **“Nuevo Método de Esperanto”** de Fernando de Diego - la prezo inkludas sendokoston al Hispanio.

Antaŭpago necese al la konto je la nomo de Madrida Esperanto Liceo ĉe Banco Sabadell/Atlántico numero 0081/7110/98/0001266730

### **HEJS ĈE LA ATLANTIKA PLONĜADO**

Kelkaj HEJSanoj partoprenis la Atlantikan Plonĝadon la unuan semajnfino de Marto en la urbeto Areia Branca, 90 kilometrojn for de Lisbono. Venis al tiu kongreso preskaŭ 50 homoj el Portugalio kaj Hispanio, krom Okcitanino el Francio kaj viro el Andoro. Do, homoj el lokoj ne tre malproksimaj. Sed ankaŭ ĉiuaĝaj partoprenantoj.

La programo estis diversa kaj plurtema: prelegoj pri nuntempa literaturo, komputiloj, Andoro kaj pri la okcitana lingvo: Farri parolis pri tiu malaperanta lingvo kiu ekzistas en Eŭropo, simila al la kataluna kaj malapogata de la franca ŝtato. HEJSanoj alportis la subtitoligon de la filmo *Amélie* kaj ĉapitron de South Park fare de Álvaro Berbis kaj José Rodríguez. Aliaj spektitaj filmoj estis: *La junulino kun perlo*, kaj *eXistenZ*. Ankaŭ interesis la dubosolvado de António Martins. La lastan tagon ni ekskursis, vizitante la lokan muzeon de "Lourinhã" kaj tie ni vidis malnovajn tradiciajn ilojn de la lokanoj kaj gravajn ostojn de dinosaŭroj. Vespere ni vizitis ventomuelejojn iom malsimilaj al tiaj kastiliaj. Ni povis vidi la internon de unu el ili klarigata tre bone de la posedanto.

Venis multaj komencantoj el Hispanio kaj Portugalio kiuj studis la lingvon en mezlernejo per la projekto AKEL, (Alternativa Komunikado inter Eŭropaj Lernejoj) kiu intencas krei rilatojn inter lernejoj per Esperanto. Ili havis apartajn aktivaĵojn, ĉefe ludaj kaj paroligaj fare de Rut. Resume, ni povas konsideri la kongreson sukcesa. Menciindas junaj esperantistoj Nuno Magalhães kaj Alexandra Paz kiu okupiĝis pri la organizado kaj ĉiĉeronis tre amuze dum la ekskurso.

Nun estas nia vico fari alian bonan renkontiĝon. (Informis Jorge Pavón)

### **PRELEGO EN LA UNIVERSITATO DE OVIEDO**

La venontan 20a de aprilo, Antonio VALÉN prelegos en la Biblioteko de la Filologia Fakultato de la Ovieda Universitato pri la traduk-proceso de Donkiĥoto en esperanton.

"Fundación Esperanto" donacis ekzempleron de "La inĝenia hidalgo don Quijote de la Mancha" por la Biblioteko de la Universitato de Oviedo, kaj Astura Esperanto-Asocio proponis fari la transdonon ene de pli granda kadro.

Dank' al iniciato de María José Álvarez Faedo, profesorino pri la angla, oni proponis al samideano Valén prelegi pri la traduk-proceso de Donkiĥoto en esperanton, kune kun biografia skizo pri la genia tradukinto, nia karmemora Fernando de Diego.

Ĉiu rajtas ĉeesti la prelegon, kvankam principe ĝi celas la lernantojn de Filologio kaj ĉefe tiujn de la Esperanto-kurso "Iniciación a la lengua internacional esperanto", direktita de María José Álvarez Faedo, kaj instruita de Carlos Enrique Carleos Artime. La kurso havas valoron de 4,5 t.n. "kreditoj". Ni atendas vin la 20an de aprilo en: Biblioteca de Humanidades, Universidad de Oviedo, Campus de Humanidades "El Milán", C/ Teniente Alfonso Martínez, s/n, Oviedo.

### **KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ**

3a Printempa Renkontiĝo. 29an - 30an de aprilo kaj 1an de majo en Canet de Mar (Barcelona)

Pli da informoj ĉe [www.esperanto-ct.org/3printempa](http://www.esperanto-ct.org/3printempa)

65a Hispana Kongreso de Esperanto. 21an-25an julio. El Puig (Valencia) [www.esperanto-es.net](http://www.esperanto-es.net)

14a Internacia Semajno de la Kulturo kaj Turismo. 24an Septembro – 1an Oktobro. La Pineda (Tarragona) <http://personales.ya.com/semajno/>

**65 A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO**

El Puig (10 km de Valencio). 21a - 25a de julio 2006. Pli da informoj <http://www.esperanto-es.net/congreso2006>. Tie vi trovos informojn pri kotizoj kaj aliĝilon. Jen la aliĝ-prezoj ( en eŭroj):

Kategorio	Ĝis la 31 a de majo	Ekde la 1 a de junio
HEF-ano	25	33
Ne HEF-ano	30	38
Juna HEF-ano	18	24
Juna ne HEF-ano	22	28

Pagmaniero / forma de pago:

Bancaja. C/ Málaga 37 · 46009 Valencia. C/C 2077-0069-24-3100702329

Kunsendu la pagpruvilon kaj la aliĝilon al la adreso: Augusto Casquero de la Cruz. Avenida Burjasot 29, A-31. 46009 Valencia. [augustocasquero@hotmail.com](mailto:augustocasquero@hotmail.com)

**HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO**

La Sekretariino, Carmen Suárez, deĵoras lunde vespere (17,00-20,30h), dum aliaj tagoj vi povas faksi aŭ telefoni al 91 446 80 79 (aŭtomata respondilo) aŭ kontakti rete: [admin@esperanto.es](mailto:admin@esperanto.es)

NOVA @-ADRESO DE HEF: [admin@esperanto.es](mailto:admin@esperanto.es) kaj [www.esperanto.es](http://www.esperanto.es)

**DON QUIJOTE HABLA ESPERANTO**

Disoneblas la libro "Don Kiĥoto parolas esperanton/Don Quijote habla esperanto" eldonita de HEF kun la tekstoj de la prelegoj pri Don Quijote kaj la desegnoj de la internacia konkurso por e-junuloj "Kiel vi vidas Don Kiĥoton?" HEF vendas la libron je 10 eŭroj plus sendokosto (ĝis 4 ekzempleroj 3,76 eŭroj). Antaŭpago necese al la konto de HEF ĉe BBVA: 0182-1252-31-0204011961

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Konversacia-rondoj okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en Rodríguez San Pedro,13-3-7 . Tel. 91 446 80 79.

**17-an aprilo 19,00h "Angkor, la juvelo de Kambojo". Lumbildoj**

**ESPERANTA BANKEDO**

**22-a de aprilo, je la 14,00.**

Restaurante Candilejas, c/Candilejas, 32 (Vallecas, proksime de la Madrida Parlamentejo).

Pago: 29 eŭrojn (surloke)

Transporto: RENFE (Asamblea de Madrid – Entrevias). Aŭtobusoj: 57, 136 (haltejo Eroski). Metroo: Portazgo (10-15 minutojn piede)

**KONFIRMI ANTAŬ LA 3 a DE APRILLO AL PEDRO HERNÁNDEZ : 912 23 48 53, 667 721 951.**

[esperanto@mi.madridtel.es](mailto:esperanto@mi.madridtel.es)

LA LINGVO DUM LA BANKEDO ESTOS ESPERANTO, DO, SPERTAJ ESPERANTISTOJ BONVOLU NE KROKODILI INTER VI. UNU EL LA CELOJ DE LA BANKEDO ESTAS, KE GELERNANTOJ ĜUU LA ETOSON KAJ EKPAROLU. TAMEN, KOMENCANTOJ KAJ NE ESPERANTISTOJ ESTAS BONVENAJ

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**

Asociación de Utilidad Pública Municipal  
San Alejandro 6- 4ºB EXT  
28005 Madrid